


## Uzmaniero de sitelen pona enhavata en la tiparo Nishiki-teki

https://umihotaru.work/

**2024-02-13 NOVIGITA ツ : La ĝisdatigitaj partoj estas montrataj ruĝe.**
**2024-02-25 NOVIGITA ツ : La ĝisdatigitaj partoj estas montrataj purpure.**
**2024-03-02 NOVIGITA ツ : La ĝisdatigitaj partoj estas montrataj rozkolore.**
**2024-03-26 NOVIGITA ツ : La ĝisdatigitaj partoj estas montrataj blue.**

Nishiki-teki enhavas la literojn *sitelen pona* laŭ UCSUR, kaj iliaj kodpunktoj estas U+F1900 - U+F19FF.
http://www.kreativekorp.com/ucsur/charts/sitelen.html

### Sitelen Pona: U+F1900 - U+F19FF




Ŝanĝis la defaŭltajn formojn por *soko* kaj *epiku*.


Ĝi ankaŭ subtenas sufiĉe da kunmetitaj literoj. Pli ol 41,000 kunmetaĵoj povas formiĝi.



Por prezenti kartuŝon, kiu kadras propran substantivon, uzu la signojn U+F1990 KOMENCO DE KARTUŜO kaj U+F1991 FINO DE KARTUŜO. Literoj inter ambaŭ signoj estos kadrita aŭtomate.

U+F1990 START OF CARTOUCHE (


U+F1991 END OF CARTOUCHE )




Por skribi longan literon *pi*, kies malsupra streko longiĝas ĝis sekvaj literoj, metu la signon U+F1997 KOMENCO DE LONGA SIGNO tuj post U+F194D SIGNO PI, kaj malantaŭe de kelkaj sekvaj literoj metu la signon U+F1998 FINO DE LONGA SIGNO por indiki la ekstremaĵon.
Tio funkcias same kun ankoraŭ aliaj pluraj literoj krom *pi*, konkrete: 


U+F1997 START OF LONG GLYPH SP SLG

U+F1998 END OF LONG GLYPH SP ELG



La literoj X Y Λ Λ ) ∸ ρ ||| # ⊸ I = ¡ povas longigi sian malsupran strekon mal-dekstre. Por tio, uzu la signojn U+F199A KOMENCO DE INVERSA LONGA SIGNO kaj U+F199B FINO DE INVERSA LONGA SIGNO.
X Y Λ Λ ∸ ||| # I = povas longiĝi ankaŭ ambaŭdirekte.




Ankaŭ subtenas tion, kio troviĝas en tiparoj de Kreative.




Aldone, sekvante ĝin, ankaŭ ĉi tion.





Por formi kunmetitan literon, metu unu el la signoj U+200D NULO-LARĜA KUNIGILO, U+F1995 STAKIGA KUNIGILO kaj U+F1996 ENVOLVA KUNIGILO inter du literoj.
La signo U+F1995 aperigos formon ke la sekva litero surmetiĝas sur la antaŭa litero.
La signo U+F1996 aperigos formon ke la sekva litero estas envolvita ene de la antaŭa litero. Tamen, se la antaŭa litero estas tiel forma, ke alia signo ne povas esti metita enen, la rezulto estos la sama kiel uzi U+F1995.
U+200D aperigos unu el ambaŭ formoj, kiu aspektas pli konvena. En kelkaj kom-binaĵoj, la formoj povas aspekti malsamaj de iu el la supraj.

**U+200D ZERO WIDTH JOINER**

**U+F1995 STACKING JOINER**


**U+F1996 SCALING JOINER**



Estas kelkaj kombinaĵoj, kiuj aperigas iom unikajn formojn.



Se signovico konsistanta el *wan*, *tu* kaj *luka*, kiu signifas iun nombron el 1-20, ligiĝas per la kunigiloj, ĝi prezentiĝas kiel kunmetaĵo.




Formoj de jenaj literoj povas esti ŝanĝitaj per variaĵaj elektiloj.


U+FE00 VARIATION SELECTOR-1

U+FE01 VARIATION SELECTOR-2

U+FE02 VARIATION SELECTOR-3


U+FE03 VARIATION SELECTOR-4







*1: jan Toluneko li pali e ni


Kompreneble, ankaŭ ĉi tiuj variaĵoj povas esti komponantoj por kunmetaĵoj.




Estas specialaj kombinaĵoj por kelkaj nimisin.




**Paskaj ovoj...** 🥚


aŭ
PaliPape
aŭ
ma toki pona VR
ma pona pi toki pona
aŭ
Linku
lipu tenpo
telo sitelen
suno pi toki pona
mun pi ante toki
Seka

**Specimena teksto**






Nishiki-teki ankaŭ enhavas la literojn por *tuki tiki* nomatajn *titi pula*, laŭ asignado de la tiparo *sitelen seli kiwen* kaj aliaj.
La kodpunktoj estas U+F1C40 - U+F1C7F.

## Titi Pula: U+F1C40 - U+F1C7F




Per la signoj U+F1C7E KOMENCO DE KARTUŜO kaj U+F1C7F FINO DE KARTUŜO, oni povas estigi kartuŝon por titi pula.

U+F1C7E START OF CARTOUCHE TP SC
U+F1C7F END OF CARTOUCHE TP EC




Uzante la samajn stirsignojn kiel *sitelen pona*, oni ankaŭ povas formi kunmetitan literon.

U+200D ZERO WIDTH JOINER

U+F1995 STACKING JOINER

U+F1996 SCALING JOINER



Per la signoj U+F1997 kaj U+F1998, la litero *lu* povas prezentiĝi kiel linio etendiĝanta sub sekvaj literoj.


U+F1997 START OF LONG GLYPH

U+F1998 END OF LONG GLYPH






## Specimena teksto



Originala teksto de ka Tumu, *lupa tiku lu kiku Papala*, kati tiki tu lili, p. 4
https://liputenpo.org/kati-tiki-tu-lili/